

Internacia Fervojisto



Dumonata organo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFE)

revuo pri fervojo

ISSN 1397-4270

2023.4

La reloĵ ligas la landojn – Esperanto la popolojn



Estimataj gelegantoj,

Eŭropa paradokso.

Kun granda intereso kaj eĉ rideto mi sekvis artikolojn kaj retkomunikadon en E-fervojista medio komence de Junio pri enkonduko de angla lingvo por kondukistoj de longdistancaj trajnoj, kiun preparas Eŭropa Unio kiel direktivon.

Pri la afero detale skribas Pierre Dieumegard de Eŭropo Demokratio Esperanto en sia artikolo „Ĉu Eŭropa Unio devigos trajnŝoforojn paroli la anglan?“. Mi iomete cerbumadis pri motivoj de aŭtoro(j) de tiu ĉi iniciato kaj mi provis kelkajn eblecojn:

- ĉu la motivo estas tiu, ke angla lingvo estas vaste uzata en aviadiltransporto? Ne, tiu motivo ne estas aplikebla por fervoja transporto. Ambaŭ transportrimedoj havas tute malsamajn kondiĉojn. Ankaŭ Pierre Dieumegard en sia artikolo eksigis tion,

- ĉu angla lingvo kiel preskaŭ „neŭtrala“ por eŭropanoj estus la plej taŭga? Kial aŭtoroj ne elektis ekzemple neŭtralan Esperanton aŭ portugalan, slovenan kaj aliajn por ne preferi multe pli amasparolatajn lingvojn en Eŭropa Unio?

- eble la motivo estis tiu, ke la angla lingvo ludas ĉefan rolon en elektrotekniko, informadiko kaj multaj aliaj industrisektoroj. Sed ĉu en fervojtransporto? Estas aliaj landoj-lingvoj, kiuj nun havas multe pli da spertoj kun fervoja industrio – germana, franca, itala, hispana, ĉina, japana Kial ne uzi unu el tiuj lingvoj por unuecigi fervojistaron?

Vi mem vidas, ke la ideo pri unueca lingvo por kondukistoj estas sensenca strebado. Ĉefe pro tio, ke fervojo mem dum sia 180-jara historio jam delonge solvis problemon de komunikado inter trajnanaro kaj trajnregada servistaro dum transiro el unu lando (lingvo) al alia.

Laŭ mia opinio ekzistas en Eŭropo multe pli gravaj solvendaj problemoj.

Via redaktoro

Enhavo:

Salutvortoj por la 74-a IFEF-kongreso, Antverpeno, Belgio	64
Resuma jarraporto de la landaj asocioj de IFEF pri la jaro 2022	66
Kia estis la 74-a?	70
<i>Europaspåret</i> -nova tunelo inter Svedio kaj Danio?.....	74
Studentoj kaj esperantistoj komune en <i>Olomouc</i>	76
Porfervoja okazaĵo en <i>Umeå</i> 2023-04-29.....	77
Kion povas alporti Esperanto?	78
Amuza anguleto	80

Titolpaĝo: Inaŭguro de la 74-a IFEF-kongreso

Internacia Fervojisto

Dumonata fervojfaka revuo en Esperanto kaj organo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF)

Apero: Januaro, Marto, Majo, Julio, Septembro, Novembro

Redaktofino: La 10-a de la antaŭa monato

Estraro de IFEF

Prezidantino: Rodica Todor (Rumanio) prezidantino@ifef.net

Sekretario: Vito Tornillo (Italio) sekretario@ifef.net

Kasisto: Laurent Vignaud (Francio) kasisto@ifef.net

Redaktoro: Ladislav Kovář (Ĉeĥa Respubliko) redaktoro@ifef.net

Gvidanto de la Faka Komisiono: momente neokupita

Membroj de la Redaktora Komisiono

Lene Niemann (Danio), Guido Brandenburg (Germanio), István Gulyás (Hungario), Zlatko Hinšt (Kroatio), Laurent Vignaud (Francio)

Membroj de la Faka Komisiono

Guido Brandenburg (Germanio), ts@ifef.net

Jaroslav Matuška (Ĉeĥa Respubliko), fas@ifef.net

Bank-Konto:

Nomo: „Laurent Vignaud”

IBAN: FR33 20041 0 1011 0929 374Y 03237

BIC: PSSTFRPPNTE

UEA-konto: iffk-o

Retejo: www.ifef.net

Facebook: <https://www.facebook.com/pages/IFEFF-Internacia-Fervojista-Esperanto-Federacio/726039834155372>

Salutvortoj por la 74-a IFEF-kongreso, Antverpeno, Belgio



Estimata prezidantaro, karaj gekongresanoj,
mi proponas al vi iom da historio!
Kongresi en Belgio por la tria fojo estas bonega okazo rememorigi pri la kontribuo de la belgaj fervojistoj kaj esperantistoj al disvolviĝo de nia movado, sed ankaŭ ĝermo de espero, ke ilia agado povas esti daŭrigata sukcese.

La statistikoj ofte aspektas sekaj, sed ili estas ege gravaj historiaj mejloŝtonoj, kiuj priskribas dum-

jarajn kontribuojn de niaj movadanoj. Jen kelkaj menciindaj datrevenoj, kiujn ni povas marki fiere ĉijare:

- 130 jaroj de la mencio de la unua esperantisto pri kiu oni skribis en la jaro 1893 en Belgio;
- 125 jaroj de la unua E-kurso organizita en Bruselo, samtempe kun kreo de la unua E-grupo en *Gilly*, apud *Charleroi*, en Marto 1898;
- 120 jaroj de la fondiĝo de la Antverpena Grupo Esperantista en la jaro 1903, tiam kun 50 membroj. Dank' al la riĉa agado de tiu grupo, stariĝis en la jaro 1905 en Antverpeno la Belga Ligo Esperantista kaj ĉijare la grupo festas 70 jarojn de kiam la antverpenaj esperantistoj organizis la 1-an Beneluksan kongreson en 1953.

Kiam temas pri la pionira agado de la belgaj fervojistoj esperantistaj, ni markas 40 jarojn de la 35-a IFEF-kongreso en la jaro 1983 en *Oostende*, la dua post tiu en Bruselo, en la jaro 1964. Sed la unua mencio de 2 belgaj anoj en la internacia fervojista movado estas registrita en 1929. La Belga Esperanto Fervojista Asocio (BEFA) ekĝermis en la jaro 1951 kaj en 1952 okazis ĝia fondkunveno en la suda stacio de Bruselo. 29 membroj aliĝis tiam al IFEF. Inter la plej konataj aktivuloj estas Lucien De Sutter (1924-2021), longtempe la ĉefkomitatano de IFEF. La posteulo de BEFA estas la nuna Belga Amikaro de Fervojistoj Esperantistaj, kiu fondiĝis en 2019 por daŭrigi la longan historion de la

belga movado.

Ankaŭ la fervojo en Belgio estis inter pioniroj kaj ĝuste pro tio, laŭ la propono de la Eŭropa Komisiono, la jaro 2021 estis la Eŭropa Jaro de Fervojoj, cele marki plurajn gravajn datrevenojn por la fervoja transporto, inter kiuj la 175-an datrevenon de la unua fervoja ligo inter du ĉefurboj de EU (Parizo - Bruselo).

Jen kial kongresi en lando kie la Esperanta movado estis unu inter la plej fortaj en Eŭropo kaj konatiĝi kun la posteuloj de tiuj pioniroj estas forta argumento por ege sukcesa aranĝo.

Antaŭ ol fini mian saluton, en la nomo de IFEF, mi kore dankas niajn belgajn gekolegojn, kiuj pretis transpreni ĉi tiun ampleksan organizan taskon, kaj sincere gratulas al la LKK por fervora planado kaj preparado de tiu kongreso.

Kvankam la tuta teamo estas meritoplena, mi konkretigos tiujn dankojn per atribuo nur al kelkaj la honorigajn diplomojn pro elstaraj kaj sindonaj meritoj subtene al IFEF. Estas tradicia momento dum solena inaŭguro.

S-ino Kristin Tytgat, la prezidantino de Belga Esperanto-Federacio, gvidanto kaj motoro de la Loka Kongresa Komitato kiu respondecas pri la organizado de tiu aranĝo. IFEF dankas al ŝi la restarigon de belga asocio de amikoj de fervojo surbaze de la antaŭa malaperinta BEFA kaj, pere de tio, nian ĉeeston ĉi tie. Ŝi multege kaj plurflanke agadis en la lastaj du jaroj ekde kiam oni anoncis kongreson en Belgio kaj plene meritas gratulojn kaj niajn sincerajn dankojn.

S-ro Piet Glorieux – kiu laboradis pri la organizado de tiu kongreso ĉefe per la plej malfacila flanko de iu ajn kongreso, la financa flanko, kaj kiu ankaŭ diskrete sed ege kapable subtenis la fakan kunlaboradon kun la IFEF-respondeculoj.

S-ro Marc Cuffez, unu el la plej malnovaj kaj aktivaj membroj de la belga asocio kaj de IFEF, kiu krom la landa agado aktive kunlaboras en la interfaka projekto Verden, financata de Eŭropa Komisiono.

S-ro Yves Nevelsteen, ege aktiva koncerne la informadan flankon... kaj pri kiu ni multe esperas longdaŭran estontan kunlaboradon.

S-ino Michèle Villers, gaja, forta, ege kapabla valona esperantistino, kiu transprenis sola sur siajn ŝultrojn la organizadon de mirinda

postkongreso.

Laste, sed plej grave, s-ino Clara Bracke, famkonata de ni ĉiuj pro sia sindona kaj nelacigebla plurjara subtenado de la agado ne nur de la landa asocio, sed ankaŭ de nia federacio. De jaroj ŝi estas ĉiam inter la kongresanoj, kaj dank' al sia oferemo multaj ekstereŭropaj personoj povis aliĝi al nia federacio.

IFEF honorigas ŝin per Honora Membreco.

Mi transdonas kun granda plezuro al s-ino Clara Bracke la diplomon de Honora Membro de IFEF.

Post tiu emociiga momento, en la nomo de IFEF mi deziras al vi belajn kaj informriĉajn eventojn dank' al la proponitaj fakaj, kulturaj kaj turismaj programeroj.

Per tiuj vortoj mi deklaras la 74-an IFEF-kongreson malfermita!

Rodica TODOR, prezidantino de IFEF

Resuma jarraporto de la landaj asocioj de IFEF pri la jaro 2022

La landaj asocioj de IFEF, surbaze de la dissendita demandilo, preparis siajn jarraportojn pri la jaro 2022. En la jaro 2022 IFEF ne plu ricevis informojn de Ĉina asocio. Ne venis ankaŭ raporto de Slovenio. Male en Aprilo 2023 la estraro estis informita, bedaŭrinde, pri la ĉesigo de la slovena asocio.

En la jarfino de 2022 ekzistis 13 landaj asocioj de IFEF, jene: Aŭstrio, Belgio, Bulgario, Ĉeĥio, Francio,

Germanio, Hispanio, Hungario, Italio, Kroatio, Pollando, Rumanio kaj Slovenio. IFEF havas individuajn membrojn en 10 landoj: Danio, D.R. Kongo, Suda Koreio, Kubo, Israelo, Nederlando, Norvegio, Rusio, Slovakio kaj Svedio.

1. La landaj asocioj

La landaj asocioj raportas pri 487 asociaj membroj (inkluzive 13 IM). Tiu nombro estas kun 6 membroj malpli ol en la antaŭa jaro.

Rimarkinde estas ankaŭ, ke PEFA havis 5 membrojn kaj en la jaro 2022 atingis 22 membrojn kaj pagis 10 kotizojn, kun 2 kluboj en Poznano kaj Vroclavo.



Se ni ekzamenas la lastajn jardekojn la tendencon de la malkresko de la membro-nombro de fervojistaj esperantistoj, ni povas konstati ke en ĉiu jaro grave malkreskis tiu nombro. La membro-nombro en la jaro 2005 estis 2310, en la jaro 2010 estis 1710, en la jaro 2015 estis 1069, en la jaro 2020 estis 790.

Laŭ la jarraportoj 10 landoj havas inter 10 kaj 50 membrojn, 2 landoj havas inter 51 kaj 100 membrojn, kaj 1 landa asocio havas pli ol 100 membrojn. Inter ili ni povis konstati ke 56 estas aktivaj fervojistoj, 238 emeritaj fervojistoj, 16 iamaj fervojistoj, 177 nefervojistoj. Germanio, Ĉeĥio kaj Pollando raportas pri 7 junaj membroj (ĝis 30-jaraĝo).

En kelkaj landoj estas E-klubo en diversaj urboj, sume 23.

Laŭ la kotizoj IFEF nombras en la jaro 2022 (inkluzive 13 IM) 256 membrojn, kiu nombro estas kun 12 membroj pli ol en la antaŭa jaro.

Se ni komparas dum la pasintaj jardekoj la membro-nombron de IFEF laŭ la pagitaj kotizoj, la rezulto montras konstantan malkreskon. En 2001 la membronombro de IFEF estis 992, en 2005 estis 718, en 2010 estis 515, en 2015 estis 346, en 2020 estis 270.

En multaj landoj la pagitaj IFEF-membrokotizoj estas malpli ol la enlandaj membroj.

2. Organizado de jarkunvenoj kaj aliaj renkontiĝoj

En tri landoj ne okazis jarkunveno en la jaro 2022, naŭ l.a. kunvenis fizike aŭ rete. Entute 123 partoprenantoj ĉeestis dum la jarkunvenoj. En kelkaj jarkunvenoj okazis fakprelegoj aŭ distraj programoj.

3. Faka agado

Sep landaj asocioj (Ĉeĥio, Francio, Germanio, Italio, Kroatio, Rumanio) kaj Danio raportas pri la agado en la terminara laboro kaj pri faka aktiveco, pri verkado kaj traduko de fakaj tekstoj kaj materialoj pri ili interesigas 12 personoj.

FAS dum la jaro prizorgis pri la prelegoj kaj la n-ro 31 de FervojFakaj Kajeroj. Dum la 73-a IFK en *Beroun* okazis 8 fakaj prelegoj, faka ekskurso en Centra regadejo en Prago kaj dum postkongreso ekskurso en Fervoja muzeo. IFEF-membroj prelegis ankaŭ dum reta 107-a UK en Montrealo, Itala kongreso en Aŭgusto 2022, Nacia tago de fervojo en *Plzeň* (CZ), Eŭropa Civitana Renkontiĝo en *Kassel* (DE), renkontiĝo en Muzeo de Esperanto en *Svitavy* (CZ), kie okazis ekspozicio pri „Fakaj asocioj“, kaj

dum renkontiĝoj pri la projekto “Verden” en Greziljono kaj Roterdamo. Kelkaj membroj partoprenis la *Innotrans*-foiron en Berlino.

4. Instruado

Sep landaj asocioj raportas pri la organizado de 11 Esperanto-kursoj, plie seminarioj kaj staĝoj, konversaciaj aŭ korespondaj (ankaŭ rete); ne okazis en Aŭstrio, Belgio, Bulgario, Hispanio kaj Kroatio. Entute partoprenis 66 kursanoj, el kiuj 14 fervojistoj.

La lingvokursoj estis memstaraj en du landoj, kaj kvin landoj aranĝis ilin komune kun la landa aŭ loka Esperanto-asocio aŭ aliaj Esperanto-organizoj.

5. Informado en la plej vasta senco

La fervojistaj esperantistoj en du landoj (Ĉeĥio, Hungario) aranĝis ekspoziciojn, dum pluraj okazoj. En 3 landoj oni plenumis kromajn aktivecojn (pri flugfolioj, afiŝoj, retpaĝoj, ktp).

Tri landaj asocioj en propra medio informis la publikon pri Esperanto-eventoj, movadaj aktualaĵoj pere de fervojistaj gazetoj kaj aliaj fakaj kaj publikaj regionaj ĵurnaloj, aŭ rete.

Tri landaj asocioj (Bulgario, Ĉeĥio, Kroatio) raportas pri faritaj prelegoj ekster la E-movado kaj fakprelegoj kaj fak-artikoloj.

Preskaŭ ĉiu landa asocio kolektas materialon por arkivado kaj historio.

6. Landaj organoj

En la jaro 2022 kvin landaj asocioj eldonis propran organon. En Francio, Germanio kaj Hungario ĝi aperis 4-foje, en Italio kaj Rumanio 2-foje. Hispanio havas fervojistan angulon en “Gazeto Andaluzio”; entute aperis 16 bultenoj. La nombro de la jara paĝaro estis 280, laŭlande ĝi varias inter 24 kaj 88 paĝoj en formato A5 aŭ A4. Unu lando eldonis ĝin pure en Esperanto (la revuo Hungara Fervojista Mondo), la aliaj dulingve kaj ĉiuj sendas ĝin ĉu rete, ĉu papere. Kvin landoj havis spacon en aliaj organoj, kiam venis okazo.

7. Financo

En preskaŭ ĉiuj landoj nur la enpagitaj jarkotizoj provizas la asocian kason, kelkaj ricevas malgrandajn subvenciojn, nur per la redukto de la elspezoj povis ekvilibri la financon staton. Sed la situacio estis sufiĉe bona aŭ kontentiga, ili havis modestan ekvilibron.

8. Interrilatoj kun instancoj kaj aŭtoritatoj

Kvin landoj raportas pri interrilatoj kun la fervoja administracio, plejparte neregulaj. El ili unu ricevis senpagan bileton por oficiale vojaĝi al kongresoj. La aliaj tute ne havas rilatojn kun la koncernaj fervojaj administracioj.

Du landaj asocioj (Belgio kaj Hispanio) ne havis rilaton kun la landa FISAIC-sekcio, sep landaj asocioj (Aŭstrio, Ĉeĥio, Francio, Germanio, Hungario, Italio, Rumanio) ricevis financon subvencion aŭ alian helpon de la landa FISAIC-sekcio. Du landaj asocioj havas oficon en la FISAIC-organizaĵoj.

Ses landaj asocioj uzas ejon de la FISAIC-sekcio.

9. Interrilatoj kun Esperanto-organizo

Laŭ la raportoj ĉiuj landaj asocioj havis interrilatojn kun sia landa asocio de UEA.

Ĉiuj asocioj havis bonajn interrilatojn kun aliaj Esperanto-organizaĵoj. Laŭ la informoj de landaj asocioj entute estas 20 IFEF-fakdelegitoj, sed IFEF celas doni informojn pri fervojo kaj fervojistoj pere de si mem.

10. Fina komentario

La situacio de la fervojista Esperanto-movado estas pli-malpli la sama kiel en la pasinta jaro. Hungara asocio je la fino de la jaromalfondiĝis, oni rezignis pri la nuna statuso pri registrita asocio. Dum la unua asembleo 2023 la kunsido decidis ĉu daŭrigi kiel fervojista rondo sen juraj devigoj kaj tiu „Rondo” funkcias bone.

Bedaŭrinde la majoritato de la membroj de IFEF rigardas pasive la agadon de la Federacio, krom la preteco helpi de nur kelkaj membroj de la landaj asocioj, kiuj plenumas diversajn taskojn.

Post la fino de la pandemio, ni sukcesis denove kongresi fizike en *Beroun*, Ĉeĥio. La IFK bone sukcesis danke al la bona organizado de la ĉeĥaj kolegoj kaj la apogo de la FISAIC landa sekcio.

La estraro kunvenis rete minimume unu fojon monate. IFEF organizis aŭ partoprenis plurajn renkontiĝojn kun sukceso. La novaj komunikrimedoj multe helpis nian federacion, ankaŭ pro tio ni denove subskribis abonon al la reta kunvenejo “Zoom”.

Daŭre sukcesas la Erasmus-projekto “VERDEN”, kies ĉefa kunordiganto estas UEA pere de Kosmo-agentejo, en kunlaboro de diversaj asocioj. Dum la jaro okazis pluraj retaj kunvenoj kaj du fizikaj

renkontiĝoj, en Aprilo en Greziljono kaj en Novembro en Roterdamo, ĉe la sidejo de UEA.

Laŭ la raportoj de landaj asocioj, ĉiuj sugestas pligrandigi la intereson pri IFEF en la Esperanto-movado. La kunlaborado kun aliaj fakaj asocioj de UEA pere de projektoj, (vidu AMO-seminariojn, Erasmus) estas la bona vojo por esti pli bone konata en aliaj medioj, kun la espero ke tio alportos en IFEF freŝajn kaj junajn fortojn.

Dum la jaro IFEF ĉiam “semas” en pluraj direktoj, kun la espero ke venos novaj aktivuloj.

Tamen ĝenerale la Federacio kaj la estraro bone funkcias kaj por la eksteruloj ĝi aperas agema. Kadre de UEA, IFEF havas gravan rolon kaj ĝi estas respektinda kaj respektata.

Bologna la 20-an de Aprilo 2023

Vito Tornillo, IFEF-sekretario

Kia estis la 74-a?

Jes, la 74-a IFEF-kongreso en Antverpeno estas jam pasinteco. Ŝajnas, ke organizado de la IFEF-kongresoj post koronvira periodo jam revenis al siaj kutimaj procedoj ĉefe pro tio, ke ĝi okazis surloke kaj refreŝigis personajn kontaktojn kaj tio estas pozitiva informo.

Nunjara IFEF-kongreso okazis en historia belga urbo Antverpeno kun pli ol 500 mil loĝantoj. La urbo mem estas konata pro sia riĉa historio, famaj naskitoj, modernaj konstruaĵoj, grandega havenareo kaj multaj aliaj kialoj. Malfacilan kaj postuleman taskon prenis sur siajn ŝultrojn membroj de BAFE (Belga Amikaro de Fervojistoj Esperantistoj), FEL (Flandra Esperanto-Ligo) kaj amikoj el *Charleroi* (Valonio), kiuj preparis postkongreson. Tiu koncentriĝo de laborfortoj certigis sukcese organizitan kongreson kun ĉiuj necesaj programeroj, kiuj koncernis laborplanon de IFEF-estraro kaj ankaŭ fakajn, amuzajn kaj ekskursajn aranĝojn.

Denove montriĝis taŭga aranĝo de la kongreso „sub unu tegmento“ en konstruaĵo de Junulara hejmo Pulcinella, kie okazis ĉiuj programeroj krom solena inaŭguro. Ĝi okazis sufiĉe proksime en salono Thomas More de antverpena universitato, kiu disponas pri ĉio necesa por organizi tiun gravan eventon.

Enkondukan alparolon prezentis prezidantino de LKK Kristin Tytgat, sekvis salutparoloj de gravaj gastoj – s-ro Luk Lemmens, Unua deputito por la Provinco Antverpeno, respondeca inter-alie pri transporto, kaj s-ro Paul Cordy, Urbestro de la Distrikto Antverpeno. Ĉefkomitatano Zlatko Hinšt gvidis salutparolojn de reprezentantoj el landaj asocioj.



Inaŭguran programon kompletigis per prezento de koncerta muziko s-ino Aude Van de Keere je fortepiano kaj kantistino Karlijn Van Damme. Fine de solena inaŭguro deklaris prezidantino de IFEF Rodica Todor la 74-an IFEF-kongreson malfermita.



Verdire labora programo de la kongreso komenciĝis jam sabate la 6-an de Majo per kunveno dediĉita al projekto VERDEN. Dum kiu membroj envolvitaj en la projekto diskutis ĉefe pri la plej proksimaj taskoj – preparo de broŝuro kaj planoj por partopreno en UK-Torino,



kie estos la projekto oficiale prezentita kun siaj rezultoj. Estas ankaŭ grave konstati, ke la kongreso mem estis per sia faka programo dediĉita al temo de la projekto VERDEN – „Daŭripovo de la fervoja transporto“. En tiu senco estis prezentitaj multaj prelegoj kaj eĉ atelieroj

– vidu je la foto supre kiel Lars laborigis partoprenantojn dum ateliero pri kreado de VeloRelo retejo. Ankaŭ parto de fakaj prelegoj estis dediĉita al la temo de la kongreso – nome la prelegoj pri kalkulado de emisioj kaj intermodala transporto. Kun ili kaj aliaj prelegoj vi povos konatiĝi en la venonta numero de FervojFakaj Kajeroj.



Ĉefaj prelegoj estis nunjare du – pri stacidomo *Antwerpen Centraal* el vidpunkto de arkitekta fakulo – s-ino Ella Strug kaj la dua pri historio de la unua pasaĝera fervojo sur la eŭropa kontinento kiun prezentis doktoro pri historio s-ro Vladimir Ronin. La centran antverpenan stacidomon „juvelon inter stacidomoj“ povis viziti parto de partoprenantoj kaj detale trarigardi dum duontaga ekskurso sub gvidado de Ella. En sama tempo Vladimir gvidis grupon kun celo viziti centran parton de la urbo kaj konatigi partoprenantojn kun ĝiaj historiaj interesaĵoj. Oficialaj programeroj de la kongreso iris glate sub gvidado de la prezidantino kaj la sekretario. La plenkunsido aprobis gravajn raportojn, informojn kaj konfirmis du membrokotizojn por nuna periodo en sama alto kiel ĝis nun. Venontaj kongresoj okazos en la jaro 2024 en Strasburgo kaj la jaron poste en Slovakio.



Dum lastaj kongresoj montriĝis konvenaj programpunktoj – Esperantokurso kaj atelieroj. Pri VeloRelo-ateliero mi jam skribis supre. Fortan intereson ankaŭ altiris ateliero pri ludado je nekonata muzikinstrumento – fretocitro sub gvidado de Johan Van Eenoo kaj E-kursoj.

Por vesperaj programoj preparis organizantoj prezentaĵon de flandra muziko pere de s-ino Lief Verbeeck – ludanta tipan flandran muzikinstrumenton vjelon kaj s-ro Bernard Van Lent akordionisto. La programon kompletigis Lode Van de Velde per prezento de tipaj antverpenaj kutimoj kaj interesaĵoj.

Klasikan muzikon prezentis juna duopo de violonistoj. Amuzan vesperon kompletigis konata duopo Saša Pilipović kaj Georgo Handzlik kun prezentado de siaj skeĉoj.



En programo de la kongreso ne mankis ankaŭ ekskursoj – dum la tuttaga ekskurso partoprenantoj havis eblon vidi parton de la grandega Antverpena haveno kun impona sidejo de havena administracio, kiun projektis jam mortinta arkitektino Zaha

Hadid kun gekolegoj. Partoprenantoj de la ekskurso estis konsternitaj per grandeco de la haveno kaj amplekso de transportata varkolekto kaj grandega nombro de homoj, kiuj tie laboras. Multe pli malgranda, sed tamen tre interesa estis fervojmuzeo en stacio *Meldegem* kun veturo per etŝpura trajneto.



Fervojan temon havis ankaŭ vizito de muzeo *Train World* en *Schaarbeek* proksime de Bruselo. La tiea ekspozicio estas moderne aranĝita kun aŭd-vida akompano. Centron de la ekspozicio formas unikaj historiaj lokomotivoj.

Lasta ceremonio okazis ĵaŭde la 11-an de Majo, dum kiu ĉeestantoj aprezis LKK kaj helpantojn per aplaŭdo.

Venontan tagon parto de kongresanoj translokiĝis al *Charleroi* – loko kie okazis postkongreso. Tie atendis la partoprenantojn Michèle Villers kun helpantoj, kiuj dediĉis sin al ni dum sekvantaj tri tagoj. Tuj la unua vizito en *Charleroi* kondukis nin al iama minejo, nun muzeo en *Bois du Cazier*, kie oni memorigas minej-katastrofon en la jaro 1956 – vere kortuŝa loko.




Venontan tagon, sabate, celo de nia trajnveturo estis urbo *Namur* – centro de Valonio kun sia konata citadelo. Agrablan viziton de la urbo substrekis bela vetero, kiu ebligis belajn elrigardojn el citadelaj muregoj kaj ankaŭ komfortan promenon en la

urbo dum surstrata bazaro.

Lasta tago estis dediĉita al vizito de ŝiplifto en *Strépy-Thieu*. Impona konstruaĵo videbla iam el fora distanco ebligas superi 73-metran diferencon inter niveloj de malsupra kaj supra kanaloj, kio ŝparigas vojaĝtempon de ŝipoj survoje sur la Centra belga kanalo.

Do, kia estis la 74-a IFK? Koncize dirite – belega kaj interesa, iam pluvema, sed ĉiam kun varma etoso de organizantoj.

Ladislav Kovář



Europaspåret – nova tunelo inter Svedio kaj Danio?

Malgraŭ ke la firma interligo *Öresundsbron* inter Kopenhago kaj *Malmö* estas „nur” 20-jaraĝa, ekzistas gravaj kapacitproblemoj en la proksima horizonto. Kiam malfermiĝos la *Femern*-interligo (inter Danio kaj Germanio) en 2029 oni antaŭvidas trioblan ŝarĝtrafikon trans

Øresund. La du-traka fervojlinio de la nuna *Øresundsbron* verŝajne ne sufiĉos.

Jam en 2015 la iniciato *Europaspåret* fondiĝis kun du-persona sekretario. *Landskrona* komunumo ĝin iniciatis, kaj la komunumo ankaŭ pagas la du personojn. *Europaspåret* post la fondiĝo tuj komencis esplori la eblecojn helpi pri tiuj estontaj kapacitproblemoj. Oni celas al tunelo inter *Landskrona* kaj Kopenhago, kiel montras la mapo, kaj kun konekto al la fervojlinioj jam ekzistantaj en Svedio kaj Danio.



Fonto *Europaspåret*

La elirpunkto estas, ke Svedio pagu la plimulton de la prezo por konstrui la interligon, ĉar la sveda industrio havas la plej grandan intereson havi „larĝan straton” al Eŭropo. Poste la uzantoj pagu, kiel estas jam la kazo pri *Øresundsbron*.

Temas pri fervoja ŝarĝtrafiko klimat- kaj mediprotekta – fervoja anstataŭ aŭtomobila ŝarĝtrafiko. Ekzistas multaj spertoj de la konstruo

kaj posta uzo de *Öresundsbron*, kiujn oni povas kaj volas uzi. Oni ankaŭ antaŭvidas ke la fabriko ĉe *Rødbyhavn*, kie baldaŭ komenciĝos produktado de beton-elementoj por la tunelo tie povos ĝin daŭrigi post finita „*Femern-laboro*” tiel ke oni ŝparos konstruadon de nova elementfabriko ĉar la nova tunelo inter *Landskrona* kaj Kopenhago laŭ konstrumaniero estu kopio de *Femern*-interligo. Per tio oni ŝparu ĉ. 10 elcentojn de la tuta projekt-prezo.

Dum la unuaj jaroj oni informis pri la projekto, sed la 14-an de Aprilo 2023 okazis la unua inform-kunveno kun partopreno de komunumoj, regionoj kaj diversaj organizoj, de ambaŭ flankoj de *Øresund*. La plano estas daŭrigi pri informado kaj igi la du landojn fari iun decidon.

La prezo por la firma konekso estos ĉ. 7 miliardoj da eŭroj, kaj la konstruperiodo ĉ. 8 jaroj. Oni antaŭvidas kunfinancadon de Eŭropa Unio je 40%.

Jan kaj Lene Niemann

Studentoj kaj esperantistoj komune en *Olomouc*



Post koronvira paŭzo denove okazis faka ekskurso por studentoj kaj esperantistoj. La 26-an de Aprilo 2023 vizitis dek studentoj de Fakultato de Transporta Inĝenierio (Universitato de *Pardubice*) komune kun ok ĈeFEA-anoj

Fervojan muzeon de ČD en *Olomouc*. La studentoj povis trarigardi ankaŭ de interne preskaŭ ĉiujn vaporajn, dizelajn kaj elektrajn lokomotivojn. Nia ĉiĉerono klarigis al ni ne nur historiajn faktojn sed ankaŭ teknikajn detalojn de unuopaj lokomotivoj kaj iliaj partoj (kurentodeprenilo, bremsoj, lagroj ktp.). Post la fino de ekskurso kelkaj esperantistoj komune tagmanĝis kaj babilis.

Eble ekestas nova tradicio de komunaj fakaj renkontiĝoj de studentoj kaj esperantistoj-fervojistoj ...

Jaroslav Matuška

Porfervoja okazaĵo en Umeå 2023-04-29

La urbo *Umeå* troviĝas en meza Svedio, ĉirkaŭ 600 km norde de *Stockholm*. Fervojo kaj cetera publika transporto en la regiono estas degeneriĝintaj. Tamen lastatempe okazis tie porfervoja evento "*TÅGSEMESTER FRÅN UMEÅ*" (Pertrajna ferio el *Umeå*). La origina iniciatinto estis neŝtata organizo "*Umecom Medborgarverkstad*" (Civitana laborejo de *Umeå*), kies celo estas lokaj civitanaj rajtoj kaj intereso, do temas nek pri fervojistoj nek mediprotektantoj. Tamen poste aliĝis la lokaj mediprotektaj organizoj kaj eĉ unu privata fervoja kompanio aktivata en norda Svedio. La evento okazis la 29-an de Aprilo 2023 en salono "*Rotundan*" de la universitato.



Pluraj parolantoj sinsekve staris sur la podio kaj prezentis. Komence la ĉefa temo estis la absurdeco kaj detruemo de flugado, kaj la fervojo kiel solvo. Poste la prezentantoj fanfaronis per siaj feriaj spertaĵoj en suda

Eŭropo, kaj travivaĵoj dum la longa kaj ofte iomete komplika vojaĝo. Oni eĉ iomete parolis pri privataj fervojaj kompanioj, ilia aktiveco, kaj planoj estigi novajn noktotrajnajn liniojn en Eŭropo. Preterlasitaj estis la politikaj aspektoj kiel la obseda "privatigo" de fervojoj, komplikigita kaj "apigita" biletsistemo, kaj vasta ŝtata subtenado de aŭtomatigado, flugado kaj fosiliaj brulaĵoj. La mesaĝo celis la individuon: "vojaĝu trajne, malgraŭ ĉio".

Ĉeestis "komerc-estro" de unu fervoja kompanio el la maltravidebla strukturo ampleksanta inter aliaj markoj "*Norrtåg*" kaj "*Vy*", parte bazita en Norvegio. Mi iomete parolis kun ri antaŭ la komenco. Vendado de nefiksitaj anonimaj biletoj en aŭtomatoj lokigitaj en fervojstacioj kaj pagado per fizika mono, eĉ unu minuto antaŭ forveturo de trajno, estis rekte neimagebla por ri. Krom tio ri opiniis ke konkuro en la fervoja merkato evidente funkcias kaj multe bonas.

Taylor Hammerschmied

Kion povas alporti Esperanto?

Tiun demandon oni ofte donas al ni, kaj tuj ni komencas paroladaĉi pri niaj multaj travivaĵoj kaj kontaktoj dum la jaroj. Ĝus ni travivis ankoraŭ ion novan ... oni povas diri, ke Esperanto estas la katalizilo.

Dum la IFK en Antverpeno ni (malgraŭ ke ni ne ĉeestis) prezentis la entreprenon *fibertex*. Jen la hazardplena historio:

Antaŭ kelkaj jaroj ni transloĝiĝis al malpli granda loĝejo. Amasiĝis objektoj ĉe ni, kaj ni rapide konstatis, ke ĉion ni ne povas kunporti. Estis i.a. multaj esperantaj libroj.



Ni uzis niajn kontaktojn por fordoni anstataŭ forĵeti: la planlingvan kolekton en Vieno, la Interkulturan Centron en *Herzberg* kaj nian plej novan kontakton: la Esperanto-muzeon en *Svitavy*. Ĉu vi ion volas ricevi? De ĉiuj tri ni ricevis liston, kaj ni sukcesis fordoni, sed nun temas pri la muzeo en *Svitavy*. Ili resendis liston kun indikitaj „deziroj”, kaj ni pakis du grandajn kestojn por ili. La gvidanto de la muzeo, Libuše, prizorgis la

transporton. „Ekzistas firmao en *Svitavy*,” ŝi skribis, „kiu estas filio de dana entrepreno *fibertext* kun ĉefsidejo en *Aalborg*. Mi konas dungiton en *Svitavy*, li povas prizorgi transporton de *Aalborg* al *Svitavy*.”

Do, ni sendis la du kestojn al *Aalborg*, kaj post nelonge ni ricevis kvitancon, ke la varoj bone alvenis.

Estis fine de 2019, kaj fino de historio – laŭ ni.

Sed kiam ni en Majo 2022 iris al Ĉeĥio por partopreni la IFK-on en *Beroun*, ni volis post la kongreso resti kelkajn tagojn en *Svitavy*. Kompreneble ni kontaktis Libuše, kaj ni volis viziti la muzeon. „Ĉu vi volas renkontiĝi kun la dana direktoro de la ĉeĥa filio de *fibertext*?”, ŝi skribis, „certe li volonte renkontiĝos kun vi. Mi povas fari interkonsenton.” Ni nenion sciis pri la firmao, kaj la direktoro ja ne havis rilaton al „nia” librotransporto. Tamen ni jesis kaj iom esploris pri *fibertext* en la interreto.

Finfine ni staris en la akceptejo en *Svitavy* kaj demandis pri la direktoro ... ni eĉ ne sciis lian nomon. „Ah, Mister Knudsen!” ili diris, kaj tuj Bjarne estis alvokita.


Bjarne dungiĝis ĉe *fibertext* kiel juna inĝeniero kaj kreskis kun kaj en la firmao kaj nun ekde 2005 estas direktoro en *Svitavy*, kie laboras ĉ. 300 homoj. Li tre ĝojis paroli kun ni la danan lingvon, sed la duhora vizito ne estis nura plezuro – li kun vervo kaj granda pasio rakontis pri la historio kaj la produktoj kaj montris la tuton. En la interreto ni eltrovis, ke la firmao havas fakon pri fervojrilataj produktoj, kaj kompreneble ni demandis pri tio fine de la vizito.

Bjarne diris: „Pri tio vi demandu al Mikael en *Aalborg*.” Kaj kiam ni kontaktis Mikael, li jam sciis pri ni!

Dum nia somerferio en Jutlando en Julio ni sukcesis havi interkonsenton kun Mikael, kiu uzis tutan antaŭtagmezon kun ni kaj rakontis pri tiuj specialaj (kaj specialigitaj) produktoj. Ni diris al li, ke tre imponas nin, ke li uzas tempon kun ni, kiuj ne estas „vere fakuloj”, kiuj ne havas multajn kontaktojn, kaj kiuj estas pensiuloj. Li respondis: „La ĉefa afero estas rakonti al kiel eble plej multaj pri niaj produktoj kaj pri nia entrepreno.” Kaj nun ni jam rakontis al vi ĉiuj!

J&L Niemann

Amuza anguleto



- A vestaĵo; kamarad’
- B amata; kilometro; araba nomo; aŭstria urbo super Thaya
- C breda bird’; latine kontraŭ; parto de montar’
- D kaŝvorto
- E pasta manĝaĵo; esti gaja; en difina tempo
- F orkolora; rome 3; konjunkcio; speco de flavkoloro
- G norvega ĉefurbo; densa likvaĵo

- 1 protekta ĉapo
- 2 unua monato en jaro
- 3 mohamedan’; kapt’ beston
- 4 adjektivo de kaso; angle oleo
- 5 postsepa laŭta parolo
- 6 kemia signo de mangano; sep per romaj ciferoj
- 7 kemia signo de astato; sufikso por infano
- 8 postulilo por partopreno
- 9 rome 1999; korala insul’
- 10 aparato; antikva greka diino de venko
- 11 libro de kantoj
- 12 parto de molekulo